








**La tago, kiam mi foriris hejmon por iri  
al la urbo**

**The day I left home for the city**

-  Lesley Koyi, Ursula Nafula
-  Brian Wambi
-  Espen Stranger-Johannessen
-  3
-  Esperanto eo / English en



Ĉe la malgranda bushaltejo en mia vilaĝo estis multa agado de homoj kaj superŝarĝitaj busoj. Sur la tero estis eĉ pli da ŝarĝoj. Helpantoj kriis la loknomojn kien iliaj busoj iris.

...

The small bus stop in my village was busy with people and overloaded buses. On the ground were even more things to load. Touts were shouting the names where their buses were going.









Novaj pasaĝeroj kroĉis siajn biletojn, dum ili serĉis ie sidiĝi en la homplena buso. Virinoj kun junaj infanoj faris ilin komfortaj por la longa vojaĝo.

...


New passengers clutched their tickets as they looked for somewhere to sit in the crowded bus. Women with young children made them comfortable for the long journey.



Mi alpremiĝis apud fenestro. Tiu, kiu sidis apud mi tenis firme verdan plastan sakon. Li portis malnovajn sandalojn, eluzitan mantelon, kaj li aspektis nervoza.

...

I squeezed in next to a window. The person sitting next to me was holding tightly to a green plastic bag. He wore old sandals, a worn out coat, and he looked nervous.



Mi rigardis eksteren el la buso kaj rimarkis ke mi forlasis mian vilaĝon, la lokon, kie mi kreskis. Mi estis survoje al la granda urbo.

...

I looked outside the bus and realised that I was leaving my village, the place where I had grown up. I was going to the big city.



La ŝarĝado estis finfarita kaj ĉiuj pasaĝeroj sidis. Kolportistoj ankoraŭ enŝoviĝis en la buson por vendi siajn varojn al la pasaĝeroj. Ĉiuj kriis la nomojn de la haveblaj varoj. La vortoj sonis al mi strangaj.

...

The loading was completed and all passengers were seated. Hawkers still pushed their way into the bus to sell their goods to the passengers. Everyone was shouting the names of what was available for sale. The words sounded funny to me.





Kelkaj pasaĝeroj aĉetis trinkaĵojn, aliaj aĉetis malgrandajn manĝetojn kaj komencis maĉi. Tiuj, kiuj ne havis monon, kiel mi, nur rigardis.

...

A few passengers bought drinks, others bought small snacks and began to chew. Those who did not have any money, like me, just watched.



Ĉi tiujn agadoj interrompsj la hupado de la buso, signo ke ni pretis foriri. La helpanto kriis ke la kolportistoj eliru.

...

These activities were interrupted by the hooting of the bus, a sign that we were ready to leave. The tout yelled at the hawkers to get out.



Kolportistoj puŝis unu la alian por elbusiĝi. Kelkaj redonis monŝanĝon al la vojaĝantoj. Aliaj faris lastatempajn klopodojn vendi pli da aĵoj.

...

Hawkers pushed each other to make their way out of the bus. Some gave back change to the travellers. Others made last minute attempts to sell more items.



Kiam la buso forlasis la bushaltejon, mi fiksrigardis tra la fenestro. Mi demandis min ĉu mi iam revenos al mia vilaĝo.

...

As the bus left the bus stop, I stared out of the window. I wondered if I would ever go back to my village again.





La vojaĝo progresis, kaj la interno de la buso tre varmiĝis. Mi fermis miajn okulojn esperante dormi.

...

As the journey progressed, the inside of the bus got very hot. I closed my eyes hoping to sleep.



Sed mia menso vagis hejmen. Ĉu mia patrino estos sekura? Ĉu miaj kunikloj havigos monon? Ĉu mia frato memoros akvumi miajn ĝermintajn arbetojn?

...

But my mind drifted back home. Will my mother be safe? Will my rabbits fetch any money? Will my brother remember to water my tree seedlings?



Survoje mi enmemorigis la nomon de la loko, kie mia onklo loĝis en la granda urbo. Mi ankoraŭ murmuris ĝin, kiam mi ekdormis.

...

On the way, I memorised the name of the place where my uncle lived in the big city. I was still mumbling it when I fell asleep.



Naŭ horoj poste mi vekiĝis pro laŭta ekbruo kaj voko al pasaĝeroj kiuj reiros al mia vilaĝo. Mi ekprenis mian saketon kaj saltis el la buso.

...

Nine hours later, I woke up with loud banging and calling for passengers going back to my village. I grabbed my small bag and jumped out of the bus.





La buso veturonta reen rapide pleniĝis . Baldaŭ ĝi reiros orienten. La plej grava afero por mi nun estis serĉi la domon de mia onklo.

...

The return bus was filling up quickly. Soon it would make its way back east. The most important thing for me now, was to start looking for my uncle's house.





# Global Storybooks

[globalstorybooks.net](http://globalstorybooks.net)

**La tago, kiam mi foriris hejmon por iri al la urbo**

**The day I left home for the city**

 Lesley Koyi, Ursula Nafula

 Brian Wambi

 Espen Stranger-Johannessen (eo)

